

Christian Morgenstern,

Renkonto

tradukita de Willy Nüesch

Ni sidis ĉe du tabloj - lok' ? - en mond' ...
 Trinkejo, urb', land', stel' - ne gravas ja!
 Ni sidis ie en la vivoregno...
 Ĉe tabla duo, tie ĉi kaj tie.

Kaj brulis mia kor': Knabino fremda,
 se mi en ĉi okulojn versi rajtus -
 se rekompencus min ĉi reĝa buŝo -
 kaj se ĉi tiu reĝa man' min kronus - !

Kaj brulis via kor': Junulo fremda,
 pro kio vi profunde min ekscitas -
 ke mi genuojn viajn amus braki -
 kaj diri sole: Kara, kara, kara - !

Kaj niaj koroj preskaŭ kunbatiĝis.
 Sed ĉiu restis ĉe l' rigida tablo -
 kaj fine ni nin levis kun l' aliaj -
 eliris - kaj nin plu neniam vidis.

...

Christian Morgenstern,

Begegnung

Wir saßen an zwei Tischen - wo? - im All ...
 Was Schenke, Stadt, Land, Stern - was tut 's dazu!
 Wir saßen irgendwo im Reich des Lebens ...
 Wir saßen an zwei Tischen, hier und dort.

Und meine Seele brannte: Fremdes Mädchen,
 wenn ich in deine Augen dichten dürfte -
 wenn dieser königliche Mund mich lohnte -
 und diese königliche Hand mich krönte -!

Und deine Seele brannte: Fremder Jüngling,
 wer bist du, dass du mich so tief erregest -
 dass ich die Knie dir umfassen möchte -
 und sagen nichts als: Liebster, Liebster, Liebster -!

Und unsre Seelen schlugen fast zusammen.
 Doch jeder blieb an seinem starren Tisch -
 und stand zuletzt mit denen um ihn auf -
 und ging hinaus - und sahn uns nimmermehr.

...

*Traduko de la Germana poemo "Begegnung" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09).*

Arg-125-245 (2013-08-28 18:40:08)

La tradukinto Willy Nüesch (Ettelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en mia interreta poem-kolekto „Argiope.blog.net“. Li ankaŭ kontrolis tiun ĉi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, *1871-05-06 – †1914-03-31).*

Arg-125-244 (2004-02-01 11:01:43)

Die von Herrn Willy Nüesch verfasste Übersetzung ist in der internationalen Literaturzeitschrift "Fonto", Nr. 274 vom Oktober 2003, erschienen.